Ponta Festo en Frankfurt (Oder) 2009-05-01

Jam la trian fojon EABB partoprenis ĉe la „Ponta Festo“ de la urbo Frankfurt (Odro) per informstando je la 1-a de majo. Tiu stando informis laŭplane pri Esperanto, diversaj eblecoj de aplikado de la Internacia Lingvo kaj la eblecoj lerni ĝin, sed ankaŭ pri aktualaj preparoj pri la balotoj al Eŭropa parlamento – do ankaŭ pri EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto).
Denove tio estis bona okazo por renkontiĝi kaj pluraj esperantistoj el Francio, Pollando, Taĝikio, Berlino kaj Brandenburgio kunvenis por ĝui kaj demonstri internacian etoson. Pro tempaj malfacilaĵoj ĉifoje ne venis multaj esperantistoj, sed tamen ĉio fariĝis sukcesplene. Krzysztof Kolanowski (Pollando), kiu ankoraŭ laboras en la universitato Viadrina de Frankfurto ĉe Odro ne nur aktive preparis la informstandon, sed ankaŭ tre bone prezentis Esperanton al la alvenintaj pasantoj.
Stokon da freŝeldonitaj faldfolioj kaj specialan bildkarton de GEA ni fordonis pro informo. Komence de la festo okazis la transdono de la Esperanto-traduko de faldfolio pri Mesia Kapelo de Frankfurto al la respondeca prosperiga societo. La preĝejeto konstruiĝis en la jaroj 1915/1916 laŭ siberia ligna konstrumaniero, kiu i.a. dum kelkaj jaroj nomiĝis “Preĝejo de rusoj”. Krom tio reportiĝis pri la situacio de la Esperanto-traduko de la retejo de la turisma societo de Frankfurt ĉe Odro, kiu ĝis nun ne sukcesis veni en la interreton kaj pri komuna projekto rilate al konata preĝejo en Potsdamo.
Ĉar kelkajn tagojn antaŭ la aranĝo publikiĝis anonceto en loka gazeto pri la informstando, kelkaj homoj rekte venis al ni pro detalaj informoj kaj eĉ deziris promesitan lernolibron. Surprizo estis la vizito de berlina esperantisto kun franca amikino, kiuj legis pri nia “Ponta Festo” sendepende de la “oficiala” grupo de Esperanto-Ligo Berlin. Bedaŭrinde Johano Pachter (Berlino) kaj Irina Gerasimova (Ukrainio), kiuj deziris varbi speciale por EDE, ne atingis la feston pro teknikaj kaŭzoj.
Post la fino de la festo ĉiuj esperantistoj bone amuziĝis kaj diskutis en azia restoracio en Słubice. Jam ni priparolis kulminojn de la sekvontjara “Ponta Festo”.

Ronald Schindler
Prez. EABB